



star^{to}

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



1981-5-(87)



Kafejo CORSO - sociamuza centro apartenanta
al entreprenoj Restoracioj kaj
Mangejoj situas sur historia
urboplaco en orbo Olomouc
Riĉa elekto de la mangejoj, agrabla medio ĉe re-
produktita muziko. Vian viziton atendas laboran-
toj de restauracio.

Všem členům svazu . . .

Je před námi konec roku a většina z nás bude jak doma tak v práci bilancovat svoje úspěchy či nezdary. Tato bilance česká bezesporu také na nás. Všechny místní skupiny našeho svazu mají za povinnost bilancovat dosavadní činnost a to nejenom za uplynulý rok, ale za celé tříleté období od posledního sjezdu svazu.

Ne všude bude tato práce radostná. Stává se často, že základní organizace upadají do stereotypní práce a neuvědomují si, že to je první krok k neúspěchu. Dnešní svět nabízející spoustu možností k vyplnění volného času je velkým konkurentem dobrovolné práce zájmových organizací. Stává se, že programy našich schůzek, ale též práce s členskou základnou, nejsou odrazem potřeb, zájmů členů té které organizace, ale osobních zálib či představ předsedy či jiného funkcionáře této skupiny. Stává se, že lidé několikrát přijdou vyslechnout přednášku a když zjišťují, že jsou pouhými pasivními účastníky postupně ztrácejí zájem.

Dalším nedostatkem, řekl bych přímo neřestí, v našem hnutí je vytváření představ u začínajících zájemců, že jim esperantské hnutí může poskytnout to co jiná zájmová organizace nemůže - především pak snadný styk se zahraničím a zejména cestování bez devizových potíží. Některí naši propagátoři si přímo založili styl propagace na těchto velmi zkreslených představách, které pak způsobí více zklamání a pocitu podvodu, více ztrát než pravdivé informace.

Stále se setkáváme na jedné straně s poukazem, že v Bulharsku, NDR, Maďarsku či jinde mají esperantisté jiné možnosti než u nás a: Svaze dělej něco!, málo kdo se však hlouběji zabývá činností právě esperantistů v těchto zemích. Většina jejich úspěchů a možností vychází ze skutečností, že se plně zapojují do běžné každodenní práce v okruhu svého působení, spolupracují se svými zřizovateli, jsou iniciativní v předkládání vhodných námětů a nečekají až k nim někdo přijde. A podívejme se mnohdy na situaci u nás. Uzavíráme se do sebe, žijeme ze vzpomínek jak bylo před 30ti, 50ti či kolika lety a žehráme, že si nás nikdo nevšímá. Naš svaz má v současné době nejsilnější členské složky - věkové skupiny do 25 let a od 55 let. To je velmi varující. Přesto však řekněte, kolik právě těch mladých je v rozhodujících funkcích veškerých základních organizací?

Nechtěl bych, aby vznikl názor, že se nic nedělá. Je řada dobrých základních organizací a jejich úspěch vždycky spočívá v tom, že se nebojí práce, spolupráce, jednání ale i určitého rizika, že nebudou hned pochopeni. Nechci jmenovat ani ty dobré ani ty méně dobré. Snad každý objektivně posoudí kam patří. Naší snahou by mělo být, abychom se do sjezdu našeho svazu dostali alespoň na dobrý průměr. K tomu by měly posloužit i výroční členské schůze. Sami se přihlaste u svých vedoucích žádejte jejich svolání, projednání delegátů na sjezd a projednání připomínek s nimiž by měli vystou-

Křimský Zdenko
tajemník svazu

Kontraù la Neutron-Bomboj

La redakcio

Dimanĉan ekskursan programon oni partoprenis laŭdezire en unu el tri grupoj: la unua vizitis urbon kaj kastelon Dobříš, la dua belaĵojn ĉe la dekstra bordo de la rivero Vltava, la tria direktigis la buson pli suden kaj revene al Moravio.

170 partoprenantoj

TITANO DE LA ESPERANTO - MOVADO
/Jam kvaronjarcento dividas nin de la forpaso de doktoro
Stanislav KAMARÝT/

Stanislav, laŭdevene sudbohemiaĉo /naskita en Velešín/ atingis la titolon de doktoro de filozofio. Esperantisto li fariĝis en 1900, en la sepa klaso gimnazia, laŭ la lernolibro de F. V. Lorenc. Kaj li tuj engaĝis sin en la movado. Li kun S.K. Neumann kaj iom pli ol deko da aliaj adeptoj kunfondis en 1902 la Esperantistan Klubon en Praha kaj fariĝis unu el la fondintoj de la organizita Esperanto-movado inter ĉeĥoj, pioniro senlace aktiva ĝis sia morto. Li honeste plenumadis diversajn altajn funkciojn en la esperantistaj organizaĵoj /sekretario, prezidento, redaktoro de tri gazetoj, prezidento de la XIII-a UK en Praha/ kaj verkis nenombrelajn kontribuadojn en la ĉeĥa kaj en IL. Li estis grava kunlaboranto de la "Enciklopedio de Esperanto" kaj kun Ginz re-

navíc si můžete objednat některé další zajímavé tituly

Kredu min, sinjorino / Anglie/ 30,-- Kčs
 Ridu per Esperanto / Jugosl/ 15,-- Kčs
 Liliputo / Anglie/ 10,-- Kčs
 Gutaro / Anglie / 15,-- Kčs
 Mia Kredu / Anglie / 5,-- Kčs

Metodika - propaganda komisiono de ĈEA rekomendas

elekti en ĉiu loka grupo korespondanton - bonan esperantiston kaj stiliston - kiu kapablas skribi raportojn aŭ interesajn riportojn pri la Esperanto-agado en sia regiono. La fundamenta kondiĉo por lia /sia/ laboro estu, ke la raportoj estu interesaj kaj regulaj!/. Tiamaniere eblas elimini ĉiujn ne kvalifikajn sciigojn pri Esperanto kaj ties movado el nia preso...

serĉas

semideanon /-inon/ por studi la Esperanto-presaĵojn ricevatajn el eksterlando kaj por prepari eltiraĵojn el ili por STARTO. La sekretarioj regule pruntedonos tiujn ĉi materialojn al li /ŝi/. La materialoj post detala trastudo kaj traduko ankaŭ estus tre utilaj por guste informi nian neesperantistan publikon en niaj amasaj komunikiloj.

Jar. Klement, gvidanto
de MPK ĈEA

Sub titolo "Informo pri la internacia renkontiĝo SAEST '81" aperigis la konata ĉeĥoslovaka fakrevuo Životné prostredie /1981, nro 3, pg. 162/ artikolon de docento V. Novobilský pri la faka seminario de scienca-teĥnika sekcio de ĈEA en Ustí nad Labem. La artikolo peras per konvena maniero informon pri uzeblo de la Internacia lingvo en scienco.

oblečenie z úpletu

VHODNÉ NA DENNÉ NOSENIE, NA ŠPORT,
ALE AJ DO SPOLOČNOSTI

VÁM PONÚKA

DOM MÓDY

Prunaj

BRATISLAVA

VÝHRANY TOVAR VÁM ZABĽEME AJ NA DOBIERKU



perradian elsendon de tiuj ĉi tri muzikjuveloj de la ĉefa operarto en la Esperanta versio. Pluraj liaj unuopaj tradukoj el la ĉefa poezio aperis en diversaj literaturaj revuoj.

D-ro Pumpr tradukis sukcese ankaŭ el Esperanto en la ĉeĥan /ekz. teatraĵo de M. Dekker "La mondo ne havas atendejon", kiun prezentis la ĉeĥoslovaka radio/, publikigis vicon da prilingvaj traktatoj /ekz. "Esperanto sen aspektoj?" el la libro "Simpozio pri -ata, -ita/, li grandparte meritis pri eldono de la "Poŝatlaso de la mondo" en la ĉeĥoslovaka kartografia eldonejo 1971. Ni povus ankoraŭ longe citi gravajn aktivecojn, kiujn d-ro Pumpr sukcese praktikis dum sia preskaŭ 50 jara por- kaj peresperanta laboroj. La poŝtlasita verkaro de li estas respektinde larĝa kaj atendas ankoraŭ sian kompetentan prilaboron kaj aprezon.

Por kompletigi la homan bildon de la rememorato mi aldonas poemon Lasta bukedo, kiun skribis nur kelkajn tagojn post la morto de d-ro Pumpr lia - nur je unu tago pli aga amiko, poeto kaj kunlaborinto, Jiří Kořínek.

V. Novobilský

Lasta Bukedo /Por D-ro Tomáš PUMPR/

De ni foriris viro tia,
de kiaj rare inter ni,
modesta, dokta, multescia,
plena de krea energio'.

Majstro de lingvo kaj poeto
kaj antaŭ ĉio nobla hom',
kiu en dura sortoknedo
restis heroldo nur de bon'.

Labor-konsult' kun lia klerco
bonsanco estis kaj profit':
ĝis kern' subtila de l' afero
penetris sci' de l' erudit'.

Poemtradukojn kiu legis
en lia majetra versa rob'
jam spertis, ke ĉe li grandegis
arto kaj scio en duop'.



Li, jurdoktoro, lingvojn konis,
mirinda estis lia sci',
el sia stok' li riĉe donis
kaj el ĉi font' plu ĉerpos ni.

De edzo, patro, de amiko
ekzempla estis li model',
kvazaŭ lin pentrus di-peniko,
inter ni homoj hom' juvel'.

Ne korpe granda, sed anime,
senlace diidonanta sin,
vi ekkoninte lin intime
devis admire ami lin.

Nin ĉiujn perdo peza trafas:
la plej kapabla pasis for,
konsolon solan plu ni havas
en lia verk', en rememor'.

Jiří Kořínek
17. 9. 1972



POETO J I Ř Í K O Ř Í N E K JUBILEAS

Pensante pri nia kara jubileanto mi devas rememori tiun neordinaran tagon antaŭ tridek jaroj, kiam mi scivole foliumadis tra la unuaj poemoj de mia pli sperta kaj ĉefe multe pli kapabla kolego, kiu kvankam malnova esperantisto komencis krei verdire er la sama tempo kiel mi - post la jaro 1949. Mi rememoras, ke mi trovis inter ili veraĵajn perlojn, tiajn perlojn, ke mi plurfoje diris al mi: Jen poeto!

Hodiaŭ Jiří Kořínek apartenas al la plej konataj literaturistoj de la Esperanta mondo; por liaj nepre ekstraj kvalitoj parolas eble plej konvinke nombro de ricevitaĵ lauroj - okaze de Belartaj Konkursoj de UEA kaj pluaj internaciaj eventoj li gajnis ĝis nun 18 premiojn por la originala kaj 3 premiojn por la tradukita poezio, el tio 5foje la unuan.

Kun la nomo de Jiří Kořínek oni povas renkontiĝi sur la paĝoj de diverslandaj gazetoj ekz. de Norda Prismo, La Nica Literatura Revuo, Belarto, Paco, La Suda Stelo, Heroldo de Esperanto, Dia Regno, Fonto kaj aliaj.

Poeto Jiří Kořínek verkas en moderna stilo, kiu bone respondas al liaj ofte abstraktaj temoj kaj al kiu alkondukis lin liaj tradukoj el la Ĉeĥa lingvo.

Memstara poemaro de Jiří Kořínek bedaŭrinde ne ekzistas. Parte kompensas ĝin la poemkolekto Vitreiroj, kiun alportis la Ĉeĥa revuo Panoramo kaj kiu estis varme akceptita de liaj fidelaj favorentoj.

Prese aperis lia traduko de Maminka /Panjo/ de Jaroslav Seifert kaj Slezské písně /Sileziaj kantoj/ de Petr Bezruč, kiujn esperantigis tradukista triopo Pumpr-Hromádka-Kořínek. Respektinde kvanto da poemoj de ĉeĥaj kaj slovajakaj aŭtoroj /Březina, Hrubín, Karen.../ atendas je publikigo. Multobligita estis la traduko de Manon Lescaut de Vítězslav Nezval /koncizigita versio de tiu ĉi poemdramo estis prezentita 1968 okaze de Teatra festivalo en Pula/.

Por bezonoj de la kluboj en Brno kaj Ústí nad Labem Jiří Kořínek tradukis centojn da operarioj, duetoj, ĥoroj kaj klasikaj kantoj, kiuj estis prezentataj de profesiaj kantistoj dum solenaj vesperoj. En manuskripto restas lia kompleta traduko de opero Jakoben de Antonín Dvořák kaj Bibliaj kantoj de la sama komponisto.

Mi finas mian almenaŭ flugan rerigardon post la impona verkaro de Esperanta poeto, tradukisto, eseisto kaj senlaca aktivulo Jiří Kořínek, kiu l. 10. 1981 ĝisvivas 75 jarojn. Multon mi eĉ ne menciis. Kial ankaŭ? Ni haltis ja sole por momento, nome por elkore gratuli al nia kara jubileanto...

Eli Urbanová

El la scienca - teĥnika agado.

Dum la 14-a ĝis 17-a de aŭgusto 1981 okazis en Žilina internacia konferenco pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko /AEST 81/. Pli ol 150 partoprenintoj, 60 prelegoj /duono pri komputiko/ estis la plej gravaj signoj de la Konferenco. Ĉiuj ĉeestintoj povas ankaŭ konfirmi la admirende glatan solvodon de ĉiuj organizaj problemoj, ankaŭ de la neatenditaj, la konstruivan kontakton inter la prelegantoj kaj la auskultantaro, altan fakan kaj lingvan nivelon de la prelegoj kaj diskutoj.

Ĉi tie ni volus tusi precipe kelkajn instigojn por nia plusa laboro, precipe internacia.

Kelkajn monatojn antaŭ la konferenco anoncis sian ĉeeston la nova ĝenerala sekretario de ISAE ing. Christian Darbellay kaj petis pri ebligado pritrakti komune kelkajn aspektojn de kunlaboro inter UEA kaj ISAE kaj iliaj organoj. Ĉar ing. Darbellay ne venis, gvidon de rezervita vespero transprenis RND-ro Josef Kavka CSC, estrarano de ISAE kaj redaktoro de Scienca revuo. Ĉeestis ankaŭ RND-ro Václav Hník CSC, estrarano de ISAE kaj administranto de Scienca revuo kaj prof. D-ro Ottó Haszpra DrSc, estrarano de UEA kaj estro de la Budapeŝta Oficejo de UEA, D-ro Árpád Máthé, redaktoro de Budapeŝta Informilo, kaj aliaj. La kunveno havis nur rekomendan karakteron, sed tamen oni povas konsideri ĝin epokon-fara.

Precipe grava estis la akcepto de la propono al UEA kaj ISAE, ke ISAE funkcii plue kiel faka Asocio de UEA, konservante sian historian memstarecon. La ĝisnunaj klopodoj de ISAE enfunkciigi fakajn grupojn tutmondajn estos harmoniigitaj kun la samcelaj strebadoj de la komisiito por faka agado de UEA kaj de la unuopaj landaj Asocioj kaj de iliaj scienc-teĥnikaj grupoj. La unuopaj fakaj grupoj estos organizataj mondscale, kaj la landaj Asocioj estos petataj pri subtenado de iliaj laboroj, kvankam oni povas atendi, ke la pezocentroj de la grupoj ne estos dislokitaj egalmezure en ĉiuj landoj.

La fakaj grupoj - laŭ propraj fortoj, eventuale subtenataj fare de samfakaj neesperantistaj institucioj - eldonados siajn laborojn, la aliaj, pli malfortaj grupoj publikigos siajn laborojn en Scienca revuo. Ekz. la komputista grupo nombras ĉ. 700 membrojn. Por organizaj sciigoj servos la Budapeŝta Informilo.


La Budapeŝta Oficejo de UEA funkcios kiel Scienc-Afera Centro de UEA /SAC/. Ĝi transprenos ĝeneralajn ĉiujn scienc-aferejn laborojn /kunordigado de seminarioj, konferencoj, universitatoj, ktp./ eldonadon de diversgradaĵ publikajoj /ankaŭ universitataj/, interŝanĝadon de publikajoj /ankaŭ kun nesocialismaj landoj/.

La diskutado estis tre vigla kaj montris sinceran pretecon de ĉiuj unuecigi siajn fortojn. Ankaŭ klare evidenti, ke scienco en nia epoko estas por Esperanto unu el la plej gravaj agadkampoj.

Hodiaŭ ni povis prezenti al vi per tio-ĉi nur koncizan skizon de la temaro pritraktita en Žilina. En la venontaj numeroj de Staro ni revenados al la unuopaj problemoj.

Ni denove vokas ĉiujn, kiuj estas pretaĵ kontribui en realigado de ĉi tiuj planoj. Ne forgesu, ke ankaŭ malgranda, eta helpo estas utila kaj grava.

Jiří Laube,
sekretario de ĈEA-STS



Vjetnama socialisma respubliko. Eldonis Fremdlingva eldonejo, Hanojo 1980. 272 paĝoj plus 20 folioj kun 60 bildoj, krome aldonitaj: koloraj bildoj de la naciaj standardo kaj emblemo, originala teksto de la nacia himno kun poetoj kaj E-traduko, foto de Ho Chi Minh kaj mapo de la lando. Aŭtoro kaj tradukinto ne estas indikitaj. 13 x 19 cm, kartonita.

La libro enhavas detalajn informojn pri ĉio, kio la landon koncernas. Jen la titoloj de la unuopaj sekcioj: La vjetnama nacio, Ekonomio, Edukado-Publika Sano-Scienco kaj Tekniko, Belletro kaj artoj, Internaciaj rilatoj, Turismaj donitaĵoj. Ĉiu sekcio enhavas plurajn ĉapitrojn, kiuj konatigas leganton kun detaloj, pri kiuj neesperantistoj ordinare tute ne scias.

Sur la paĝoj 110-114 estas priskribitaj multegaj damaĝoj, kaŭzitaĵ al Vjetnamio per la pli ol 30jara milito, la poste sekvin-taj sekco, tajfuno, inundoj kaj la ĉina agreso en februaro-marto 1979. Oni menciuj almenaŭ, ke sur la vjetnaman teritorion estis ĵetitaj 7 milionoj da tunoj da bomboj, t.e. trioble tiom, kiom la tuta kvanto dum la dua mondmilito sur la mondaĵ batalkampoj, krome ankaŭ kvantegoj da napalmo kaj fosforo. Tamen la nacio, tiel peze trafita, ne ĉesis laboregi por renovigi ĉion kaj nove konstrui tion, kio antaŭe mankis.

Tial oni devas admiregi la obstinecon de la vjetnama samideanaro, kiu kapablis eĉ sub tiaj malmildaj kondiĉoj persisti kaj eldonadi E-ajn publikaĵojn, ankaŭ tiun ĉi valoran libron.

Iuj detaloj estas bonigeblaj. Oni tro ofte uzas komojn, kio iom genas ĉe legado, kvankam negranda ŝanĝo de vortordo ofte agrebligus la stilon. Preseraroj estas nemultaj, klarigo de mal-longigoj COMECON kaj G.I. mankas. Kelkfoje estas uzita "cemento" anstataŭ "cemento" kaj "vestiĝo" en la senco "restaĵo de io mal-aperinta, laŭ kies ekzisto oni povas imagi la antaŭan staton." Tiu ĉi PIV-vorto estas en la 2a eldono de PIV korektita je "ves-tiĝio." Ankaŭ troviĝas kelkaj eraroj en uzado de kompleksaj ver-botempoj, neĝusta uzado de la prepozicio "po" kaj kelkaj aliaj.

Tre bone estus, se oni estus aldoninta almenaŭ la proksimuman prononcadon de la vjetnamaj nomoj. Oni povas supozi la francan prononcadon, sed ekz. la nomo Ho Chi Minh estas en niaj radio kaj televido eldirata kun "ĉi", kio ne estas franca, sed anglamania. Kiel do legi la vjetnamajn nomojn?

Mi rekomendas arde, ke multaj esperantistoj aĉetu tiun ĉi uti-lan informican libron. Ĝi estas forta argumentaro por tio, ke ĉiuj esperantistoj malkaŝe sin deklaras por paco kaj solvado de ĉiuj internaciaj aferoj per senmilitaj traktadoj, ĉar tio estas nuntempe la plej aktuala temo.

Adolf Staŭra

SOMERMEZE. Aŭtoro Paul Kuusberg, el la estona lingvo tradukis Alma Lekko, redaktis Henrik Seppik. La postparolon/enhavantan la biografion de la aŭtoro, nask. en 1916/ verkis Endel Mallene. Formis kaj ilustris Jaan Tammsaar. Eldonis Eesti Raamat 1981, 360 paĝoj 13 x 17 cm, kartonita.

La aŭtoro priskribas mi-forme eventojn en la tragika jaro 1941, kiam la faŝista germana "Wehrmacht" /defendpotenco! / atakis So-vetunion sen militdeklaro. Oni legas pri travivaĵoj de dudekjara laboristo Olev Sookask, kiu fariĝis membro de "eksterma batali-ono," kies tasko estis, malebligi agadon de ĉiuj personoj, kiuj povus aktivaj malamike kaj kontraŭsovetoj en la lando ĉu antaŭ, ĉu post alveno de la faŝista armeo.

Aliaj gravaj figuroj de la romano estas Aksel Ruutholm kaj ingeniero Endel Elias. Dum Ruutholm jam antaŭ la aligo de Esto-nio al USSR aktivis en la laborista movado kaj poste fariĝis direktoro de uzino, ingeniero Elias estis senpartia kaj dum la soveta regado ricevis postenon pli gravan ol li havis antaŭe kaj ne agis kontraŭ la nova reĝimo. Kaj tamen oni sendas nokte grupon el la "eksterma bataliono" por aresti lin!

Oni ne povas imagi al si la kaoson, kia regis en la lando, ki-am la faŝistaj taĉmentoj estis proksimiĝantaj. Multegaj homoj malaperis pro timo, kio okazos, la burĝa tavolo kaj bienistoj atendis la elvenon de faŝistoj esperante ricevi siajn poseda-ĵojn. Estis malmulte da ĝustaj informoj, sed trovis sin ankaŭ tia fripono, kia Endel Niidas, kiu sukcesas eviti dangecon kaj utiligi kaoson por savi sin.

La libro estas bone verkita kaj katenas leganton de primilita literaturo. Iujn priskribitajn aferojn travivis la aŭtoro mem.

La lingvo estas bona, nur mi ne sukcesis trovi en miaj vorta-roj la esprimojn ratli kaj vinzi, kies signifon mi povas nur supozeti. Kelkaj aliaj vortoj estas konataj el nacilingva /sed ne el la E-lingva/ uzado: desanta, artelo, komandanturo, kvar pluaj vortoj estas klarigitaj. La ilustraĵoj estas nekutime kreitaj. Rekomendinda legaĵo.

Adolf Staŭra

Ni ĉiuj legu ĝin

ENERGIO de I. de Bruin-Kooij kaj A.J.F. de Wit, eldonis Federa-cio de Esperanto-Organizoj en Nederlando, aprilo 1981, 62 p., ofsetita tajpaĵo, ilustrita.

La aktuala temo "energio" estis samtempe centra temo de Neder-landa Esperanto-kongreso 1981. Tre nekutima fenomeno, sed nepre gusta, ĉar ĝi vicigas nederlandajn esperantistojn inter civita-nojn de la lando, en kiu fine de 1981 okazos larĝskala socia diskutado pri /nukle-/energia problemoj.

La libro, kvankam faka, estas konceptita vere ĝustanivele el vidpunkto de fakeco kaj populareco. La kompilitoj kreis verkon legindan pro la grava enhavo kaj certe vaste kaj ŝate legatan pro objektiveco de informoj, logika strukturo, koncizo kaj ankaŭ pro moderna arango. Enestas ĉapitroj: Energio, Bezonoj kaj prog-nozoj, Fosiliaj brulaĵoj, Atomenergio, Alternativaj energifontoj, Energiŝparado, Resumo kaj konkludoj.

Nefakulo ekscias tre interesajn novaĵojn. Plej vaste estas traktitaj teĥnologiaj misteroj de nukle-energia centralo kaj de ties danĝeroj. Ankaŭ la perspektivoj. Konkludoj estas raciaj, sed liberapacaj, neniuj solvoj estas trudata. La libro gvidas leganton ĝis lia propra decido pri lia propra startpunkto, la aŭtoroj ne respondas anstataŭ leganto, ku... tiel aŭ tiel kaj en kia grado... La aŭtoroj fine admonas: "Niaj decidoj estu do bone argumentitaj".

La lingvaĵo estas perfekta, du-tri miajn rimarkigojn indas preterlasi. Dezirinde estas, ke ankaŭ la membroj de ĈEA povu la broŝuron legi.

Ing. Jan Werner

Tito - por unueco kaj aŭtentaj principoj.

Redaktis kaj tradukis S. Ĉolič. Eldonis Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, Sarajevo, Jugoslavio 1980. Presis "Svetlost", Sarajevo. 41 pĝ., 20 x 13 cm, 3 fotografiaĵoj. Prezo ne indikita.

La broŝuro enhavas elektitajn dokumentojn rilatantaj la sesan konferencon de nealiancitaj landoj, kiu okazis en Havano de la 3a ĝis la 9a de septembro 1979. Unualoke troviĝas "Rezolucio pri speciala rekono al lia moŝto prezidento J.E. Tito", kiu estas unu el la kunfondintoj de la movado de nealiancitaj landoj.


Kernon de la broŝuro prezentas "La parolado de prezidento Tito en la ĝenerala debato", kiu resumas principojn, sukcesojn kaj historion de la 18 jara movado kaj skizas pluajn planojn por efika malstreĉigo de la politikaj kaj ekonomiaj mondproblemoj.

En la "Dokumentoj de la sesa konferenco" troviĝas ekstraktoj de la "Fina deklaro", kiuj traktas politikan parton /principoj, celoj kaj kriterioj de la nealianciĝo/ kaj ekonomian parton /la nova internacia ekonomia ordo/.

Interesatoj trovas en la broŝuro trafan pritrakton de la movado de nealianciĝo, kiu reprezentas en la nuna mondo gravan progreseman evolufaktoron.

La teksto enhavas minimumon da prezeraroj, kelkloke mankas fina frazoparto kaj nur escepte troviĝas diskutindaj gramatikaĵoj.

V. Novobilský



ESPERANTO - FERIADO EN KARLOVY VARY

Eksterordinare vigla estis nunjara somera feriado en Karlovy Vary. Post la sukcesa IV-a Internacia Renkontiĝo de Ercmontaraj Esperantistoj /junio 1981 en Merklín/ sekvis 20-membra vizito de junaj geesperantistoj el hungara urbo Szombathely en Nejdek.

Fine de julio ili travivis unu semajnon en nia bela Ercmontaro kaj en nia fama banejurbo. Same ĝuis nian belan regionon la septembra grupo de esperantistoj - fervojistoj el urbo Miskolc - en aŭgusto. Unu el niaj membroj travivis pli ol unu semajnon en "Lingvolaboratorio" en Szombathely.

Kvankam nia banejurbo Karlovy Vary estas konsiderata "internacia", Esperanto en ĝi estis malofte aŭdata. Ĉio eblas ŝanĝi: por venonta jaro ni invitas vin 6-an - 10-an de oktobro 1982 ankaŭ al alia flanko de Ercmontaro - en GDR. En alloga ercmontara urbeto Schwarzenberg okazos jubilea V-a Internacia Renkontiĝo de Ercmontara Esperantistoj. Post kvartaga migrado en Saksa Ercmontaro la revenontoj trans Ĉeĥoslovakio povos ĝui du tagojn en nia gastama banejurbo Karlovy Vary. Antaŭligojn jam nun akceptas S-ano R. Eichler, 9430 Schwarzenberg, Hermann-Matern-Str. 21 GDR. Por resti en nia urbo deziru ĉiujn informojn ĉe Loka grupo de ĈEA, kpt. Nálepky 7 CS 360 04 Karlovy Vary-Bohatice.

J.Kl.



SOMERA ESPERANTO - TENDARO EN LANĈOV 1981

Ni havas profundan pritakson de la sezono '81 fare de la fondinto kaj gvidanto de la Tendaro Pavel Sittauer, en kiu li ne substrekas sole pozitivajn flankojn de nun jam ampleksa moderna esperantista arango, sed neniel priasilentas ankaŭ la negativajn en la espero plej baldaŭ ilin forigi helpe de esp.volontuloj.

Venontjare kiam la tendaro festos sian seninterrompan 30-jaran ekziston, la gvidantoj proponas al la publiko lokon, kiu por sufiĉe modesta prezo ĉiuflanke kontentigos la klienton. Kvalitaj lektoroj antaŭtagmeze laŭgrupe instruos la Internacian lingvon al tendaranoj en 14-tagaĵ etapo, fakaj kuiristinoj en moderne ekipita kuirejo zorgos pri stomakoj de partoprenantoj, kiuj loĝos en modernaj kabanoj po kvar personoj, banado en ĉarma grandega digo-lago de Vranov, ekskursoj, paco-marŝoj, ludoj, karnavaloj, konkursoj, vesperaj programoj ĉe bivakfajroj - ĉio ĉi allogas ne nur interesulojn el Ĉeĥoslovakio, sed el pluraj ceteraj landoj.




La instruado, kiel dokumentas nunjara statistiko, okazis ĉi -
somere ekde la 5-a de julio en tri dusemajnaj etapoj, kiujn en-
tute partoprenis 389 ĉeestantoj, el kiuj 191 eksterlandanoj.

Kiel antaŭ nelonge menciis la sekretario de nia Asocio, pasis
jam la tempo, kiam ni devis peti redaktorojn de nia preso aŭ ra-
dio pri publikigo de eĉ minimuma mencio pri nia movado. Kontraŭe,
nun la redaktoroj propraintence vizitas niajn aranĝojn, sekvas
nian porpacan laboron kaj publikigas interparolojn kun niaj funkci-
uloj, proksimigante Internacian Lingvon al vastaj tavoloj de siaj
legantoj.

Kiel malgrandan rememoron pri nunjaraj vakancaj sunaj tagoj ni
publikigas ĉi tiujn du fotojn. Oni facile vidas novajn kabanajn,
sed fore la grupon de progresintoj sub gvido de sperta lektoro
Fr. Sedláček. La dua foto prezentas la muzikgrupon "Barbuloj" dum
bunta amuza programo. La bone konata grupo kantas tendarajn kaj
ceterajn melodiojn en Esperanto.

jelĉ.



REKREA kaj ĈEA

Antaŭ nelonge atingis letero de Turista Kooperativa Oficejo
REKREA/ vidu ĝin en la teksto/ diversajn Esperanto-Asociojn,
gazetojn kaj Radio-elsendojn en Eŭropo. Ĝi estas unua paŝo
en poresperanta kampanjo de ni. REKREA havas vere seriozan
intereson kunlabori kun nia asocio. Ankaŭ jam estis preperita
Interkonsento pri kunlaboro.

Nun estas neĉesa/ inkluzivas ankaŭ socialismajn landojn/, ke
la asocioj aŭ grupoj de la homoj turnigu al la adresoj de la
partneroj kunlaborantaj kun la REKREA petante organizi por ili
konvenajn ekskursojn al nia lando. Por multaj homoj el Orienta
Eŭropo povus esti solvitaj problemoj kun valutoj, ĉar ĉion vi
pegus en via lando pere de via valuto.

Ni atendas, ke vi subtenos nian agadon, kiu sen via helpo ne-
havas sencon kaj maleperus. Tiuj landoj, kiuj ne havas sube men-
ciitan partneron/en propra lando / de REKREA turnu sin rekte
al nia asocio aŭ al adreso de REKREA, Pařížská 26/28, CS 118 09
Praha 1.

Atentigu ankaŭ viajn geamikojn ne esperantistojn kaj se eblas
publiku nian proklamon en viaj gazetoj ankaŭ ne esperantistajn.

Kaj nun la listo de organizoj kunlaborantaj kun REKREA :

- Aŭstrujo : PHONIX REISEN, Prinz Eugen str. 70, 1040 Wien
- Belgujo : ATO, 42, rue Haute,, 1000 Bruxelles
- Bulgarujo : COOPTOURIST, ul. G.S. Rakovski 99, 1000 Sofia
- Francujo : ASSOCIATION FRANCE-TCHÉCOSLOVAQUIE, 9, boulevard Saint
Denis, 75003 Paris
- GDR : REISEBÜRO DER DDR, Alexanderplatz 5, 102 Berlin
- Germanujo : HANSA TOURIST, Hamburger str. 128, 2 Hamburg 76
- F.R. : OTS, Gartenstr. 6, 6365 Rodheim v.d. Höhe
INTERKONTAKT BONN, Mirbachstr. 02, 5300 Bonn-Bad
Godensberg
- Hungarujo : COOPTOURIST, Dórek utca 2, 1016 Budapest
- Italujo : ETLI, Piazzale Stazione 1, 43100 Parma
PLANETARIO, Via E.S. Stefano 3/F, 42100 Reggio Emilia
- Jugoslavio : PUTNIK, Dragošlava Jovanovića 1, Beograd
- Polujo : TURYSTA, ul. Białobrzaska 32, Warszawa
- Rumanujo : CARPATI, Boulevard gen. Magheru 7, Bucuresti
- Sovetunio : INTOURIST, pr.pekt Marxa 16, Moskva K-9
- Svislando : GIB, Eigenplatz 5, 3007 Bern

Vi certe povas aligi tiamaniere al specialaj Esperanto aranĝoj
en nia lando kiel Someraj E-o Tendaroj en Lančov, Printempaj
marsadoj de la amikeco kaj paco en Jablonec, Pardubice, turistaj
ekskursoj kaj aranĝoj por amikoj de la naturo kaj historio/ekskur-
soj en la historion/ kaj certe ankaŭ por aranĝoj en Slovakio.


Sed vi povas elekti laŭ la propra volo la vojon tra nia republiko,
kaj ĉie vi havos eblecon ankaŭ paroli kun geesperantistoj.

Oni kalkulas, prepari por esperantistoj ankaŭ vizitojn de la diversesej sporteaj aranĝoj. Ĉiuj tiuj vizitoj kaj aranĝoj povas esti kunigitaj kun la vizito de la Praha, Brno, niaj vinkeloj, vizito de bieroj, trikoj k.s. Se vi preferas kulturon, nian muzikon, viziti koncertojn/ ekz. konstan festivalon Praha printempo/ ankaŭ tio eblas. Ĉerte ĉiam vin povas gvidi sperta ĉiĉerono, kiu bone regas Esperanton.

rekrea

Co-operative Travel Agency
Agence de voyages coopérative
Co-op Reisbüro
110 00 Praha 1, Patařská 28/28
CZECHOSLOVAKIA

Tel.: 69217-8
Telex: 122728 rekr c
Telegr.: REKREA PRAHA



Your File
V.réf.
Ihr Zeichen

Our File
N.réf.
Unsere Nr.

Praha. aŭgusto 1981

Estimataj gekolegoj,

Turista Kooperativa Oficejo REKREA/ TKO REKREA/ kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio interkonsentis, lige kun rezultoj de la Monda Konferenco pri Turistiko en Manila aŭtuno 1980, enkonduki Esperanton en turistikon.

Ni estas pretaj proponi kaj organizi interesajn ekskursojn tra nia lando cele profundigi vian konon pri kulturaj valoroj kaj resturbelecoj en Ĉeĥoslovakio.

Ĉi tiujn ekskursantojn gvidos homoj, kiuj parolas esperante. Dum la aranĝoj vi havos eblecon ankaŭ kunveni kun geesperantistoj, ekkoni nian Movadon kaj esperantan agadon.

Ni estas ege ĝojigitaj, se vi trovos niajn proponojn interesajn kaj se vi havos intereson kunlabori. Same ni estas ege kontentaj, kaj ni pri tio petas vin, se vi informos viajn membrojn pri nia letero kaj novaj eblecoj.

TKO REKREA volonte akceptos jam nun viajn mendojn pere de niaj eksterlandaj partneroj, kun kiuj ni jam longjare kunlaboras. Liston de la partneroj ni aldonas.

Ni kredas, ke vi trovos nian agadon utilan ankaŭ por vi. Ni atendas viajn leterojn, demandojn, proponojn, dezirojn kaj opiniojn. Sendu ilin aŭdeble al adreso:

Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jileská 10, 110 00 Praha 1, CSSR.


Ĝis tiam ni restas kun estimo

Vladimír Ječný,
direktoro de TKO REKREA


PhDr. Jeromír Jeremář CSc
prezidento de CEA

Bankers: Živnostenská banka, Praha, Account No 22 945

VIZITU
NOVAN
HOTELON
JIHLAVA
EN KVARTALO
A. ZÁPOTOCKÝ
EN URBO
JIHLAVA,
MODERNA
LOĜADO,
AGRABLA
KAFEJO
KUN
DANCEBLECOJ



Elektrický žací strojek esa-rot



ROTAČNÍ ŽACÍ STROJEK ESA-ROT

je určen pro úpravu travních ploch v zahradách rodinných domků a rekreačních zařízeních. Je velmi snadno ovladatelný a pracuje bez hluku.

Žací strojek je poháněn elektrickým asynchronním motorem s trvale zapojeným kondenzátorem. Nůž je zhotoven z ušlechtilé oceli. Vodítko je dvoudílné, lze je složit pokud strojek není v provozu. Držáky vodítka umožňují nastavení vodítka do různých poloh.



Výrobce:

ELEKTRODRŮZSTVO PRAHA
PRAHA 8 - LIBEŇ
KUNDRATKA 17
Telefon 82 96 41 - 9


TECHNICKÉ ÚDAJE

Jmenovité napětí	220 V/50 Hz
Příkon	360 W
Otáčky/min	2870
Délka	550 mm
Šířka	450 mm
Výška	300/1000 mm
Hmotnost	16 kg
Šířka záběru nože	320 mm
Cena	1580,-

Dodací lhůta 1/2 roku
vyzvednout u výrobce

Elektrický žehlicí stroj

ESA-M 80



je praktickým pomocníkem v domácnosti k běžnému žehlení prádla jako vhodný doplněk k elektrické pračce a odstředivce. Nový výrobek Elektrodrůzstva Praha vyhovuje všem náročným požadavkům na moderní přístroj, určený k usnadnění práce v domácnosti.

TECHNICKÉ ÚDAJE

Jmenovité napětí	220 V/ 50 Hz
Jmenovitý příkon	2060 W
Příkon motoru	60 W
Příkon topné desky	2 x 1000 W
Regulace teploty - 2 termostaty	20-250° C
Válec: délka	800 mm
průměr	150 mm
otáčky	5 ot./min.
Celkové rozměry: délka	960 mm
šířka	290 mm
výška	350 mm
Celková hmotnost	cca 28 kg
Cena	4340,- Kčs
Dodací lhůta 1/2 roku	
vyzvednout u výrobce	

VYRÁBÍ:
Elektrodrůzstvo
PRAHA 8, KUNDRATKA 17



BALATONFÜRED 34. kongres IFEF

Od 2.5. do 8.5. 1982 se v Balatonfüredu sejdou již po 34. esperantistě - železničáři celého světa. Mezi nimi nebudou chybět ani členové naší sekce. Železničářská sekce ČES již dostala podrobné informace včetně přihlášky od tamního LKK. Zde tedy jsou ceny kongresu:


účastník kongresu - člen IFEF		70	hol.guldenů
člen rodiny a mládež do 20 let		35	" "
účastník kongresu - nečlen IFEF		80	" "
simpatianto		25	" "

Během kongresu budou pořádány výlety:

tříhod. projížďka po Balatonu		7	hol.guldenů
půldenní Tihány - Herend - Veszprém		14	" "
celodenní Hévíz - Keszthely		23	" "

Nocleh ve dvoulůžkovém pokoji s celodenní stravou 42 guldenů
Nocleh v jednolůžkovém pokoji s celodenní stravou 60 guldenů

Platit tyto poplatky z valutového přidělu by bylo pro naše účastníky problémem. Cenu v Kčs nemůžeme z toho nyní stanovit. Proto jsme požádali cestovní kancelář IBUSZ o zajištění této akce. Pošlete nám proto svoje přihlášky nejpozději do konce '81 a vše ostatní již zajistíme.



JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

Japana Esperanto-Instituto peras internacian korespondadon.

Tiu, kiu deziras korespondi kun japanaj gesamideanoj, skribu al jena adreso per preslitero kun detala klarigo nome, sekso, aĝo, profesio, hobbio(interesiĝo), kaj se eble kun sia portreto.
Japana Esperanto-Instituto Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku,
Tokio 162, Japanio

Kun koraj salutoj,

Muramacu Jukiĝoŝi
MURAMACU Jukiĝoŝi

Internacia Fakoj de Japana Esperanto-Instituto

Estimataj,

7a de septembro mi ricevis vian gazeton PACO. Mi gratulas al vi pro interesa enhavo. Por antaŭen puŝi la agadon de MEM mi proponas fondi studrondon inter ĉeĥa kaj usona Esperanto-organizaĵoj ... Se vi estas preta mi sendos al vi detalojn...

J.W.Deer
Oregon USA.

KRONIKO

En OSTRAVA-PORUBA mortis la 8-an de aŭg.s-ano Frant.KRETINSKÝ en sia 80a vivojaro. Esperantisto depost 1922, li multe labo-

ris precipe en la 30aj jaroj en Ostrava-Radvanice kiel instruisto de E kaj organizanto. Dum la lastaj jardekoj li estis membro en Ostrava-Poruba kaj tre okupiĝis pri E-a poezio. Neniam ni forgesos lian agrablan agadmanieron kaj laboron por E.
A. St.

)Lingva angulo(

Nia malgranda tehniko vortareto/ Laŭ novtempaj fontoj de ing. Werner/

dubelo - hmoždinka
 dubeli- kotvit pomocí hmoždinky
 ĉizoj- 1.stříhat / plech/, 2.křížit / v dopravě /
 hirundvosta junto-rybinový spoj
 junto per foldo kaj lango - spojení na drážku a pero
 jako - zdířka / el. tech./
 maso - hmotnost / hovorově " váha" /
 ŝeklo - třmen; závěsné oko
 ekcesora unito - vedlejší jednotka
 verleto - truhlářská svěrka
 vidvergo - výtyčka , trasírka
 oksido - kyslíční
 dunitra oksido - kyslíčník dusný / N_2O /
 kerbona oksido - kyslíčník uhelnatý / CO /
 dufera trioksido - kyslíčník železitý / Fe_2O_3 /
 silicia duoksido - kyslíčník křemičitý / SiO_2 /
 dufoŝta kvinoksido - kyslíčník fosforečný / P_2O_5 /
 sulfa trioksido - kyslíčník sírový / SO_3 /
 dumengena sepoksido - kyslíčník manganistý / Mn_2O_7 /
 osmia kvaroksido - kyslíčník osmičelý / OsO_4 /

Oficiala komunikado pri 67a UK en Antverpeno

PROTEKTAS LA REĜO,

Lia Reĝa Moŝto Balduino, suvereno de Belgio, akceptis roli kiel Alta Protektanto de la 67a Universala Kongreso.

GUBERNIESTRO KAJ URBESTRO

Jam akceptis membrecon en la Honora Komitato de la 67a UK. Urbestro de Antverpeno estas virino - s-ino M. Schreeyens , guberniestro de la provinco Antverpeno nomigas s-ro A.Kinsbergen.

SENATANO DENOVE PREZIDAS LKK.

Temas pri s-ro Fernand Piot, kiu jam pli ol tridek jarojn estas membro de UEA. Aliaj membroj de LKK estas Edward Symoens, Roger de Schepper, Erhard Boehme, Win De Smet kaj Gerd Jacques.


KONGRESA SALONO EN ZOO

do, eble tamen, estos la Kongreso iomete "sovaĝa" . Sed ZOO troviĝas apud la ĉefa stacidomo. Kompreneble por kongresanoj estas enkaŭ trarigardo de la ĝardeno senpaga.

INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO

alvokes. Kiel kutime, kleriĝemaj kongresanoj povos aŭskulti spertulojn el la tute mondo. Universitataj profesoroj kaj simile kvalifikitaj personoj povas proponi prelegojn al la konstanta sekretario de IKU, prof. Bruce Arne Scherwood, 252 Eng. Res. Lab., University of Illinois, Urbana IL 61801, USA. Bonvolu sendi, se eble en kvar ekzempleroj, proponon kun titolo, resumo, biografieto kaj reprezenta persona bibliografio, aldonante unu aktualan fotoportreton por eventuala uzo en la Kongresa Libro. Viajn proponojn sendi ĝis la fino de 1981 jaro.

ANTVERPENO



invitis la 67a Universalan Kongreson de Esperanto.

Ĝi okazos de la 24a ĝis la 31a de julio 1982.

Nia asocio volas prepari, same kiel jam ni sukcesis por UK en Luzerno kaj Stokholmo, 40 personan karavanon. La vojo por buso gvidos tra GDR, FRG, Belgujo, kie ni restos 8 tagojn kaj dum tiuj tagoj ni intencas viziti Nederlondon/ Rotterdam kaj Amsterdam/ kaj poste ni veturos en Francujon, Parizon , kie ni restos 2 tagojn. El Francujo tra Lucenburgo kaj FRG hejmen. Oni kalkulas kun 13 tagoj kaj kun la prezo inter 12-15 miloj da kronoj. Kiu volas veturi, devas aliĝi maksimume ĝis la fino de jaro 1981a ĉe nia asocio.

Kongreskotizojn, kiuj estas taŭgaj por ni, vi povas legi sube :

1. Kongresano ne membro individua de UEA	188 gld
2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro..	163 gld
3. Kongresano ind. membro de UEA kun Jarl.kaj revuo	125 gld
4. Edzine/edzo/ de kongresano en kat. 1	131 gld
5. Edz/in/o de kongresano en kat.2au 3	114 gld
6. Junulo ĝis inkluzive 20-jara	56 gld
7. Plentempa studento ĝis 30-jara	94 gld
8. Blindulo	75 gld





el junularo vivo

C I E L LA III-a

Ne troviĝas preseraro en titolo. Tiel nomiĝas ĉiujara Centra Internacia Esperantista Laborbrigado, kiu ĉi-jare okazis de 9a - 12a de aŭgusto en hungara vilaĝo Harta ĉe Danubo. La kvara etapo, kiun mi ĉeestis kiel unusola ĉefo estis bonega laborkunvivo de gejunuloj el Bulgario, Germana Demokratia respubliko, Pollando kaj kompreneble la gastiganta lando. La laboro konsistis el akvumado de maizaj kampoj kaj malmuntado de tubaroj. Dum libera tempo naciaj vesperoj, kelkaj diskotekoj kaj ekskurso al urboj Kalocsa kaj Budapeŝto. Ankaŭ bivakfajroj ne mankis.

Rekompenso por bone farita laboro ni poste pasigis unu semajnon ĉe Balatono. Bedaŭrinde ne multaj el inter nia junularo scias pri eblecoj partopreni brigadojn eksterlande, certe nur legantoj de Budapeŝta Informilo.

Dum la brigado regis vere internacia etoso kaj la aranĝaĵo navis altan nivelon dank' al la organizintoj.

Vladimír Dvořák, Brodek u Přerova

Mezlerneja ripoztendaro en Balatonszemes

estis aranĝita la 21-an ĝis 29-an de aŭgusto. Partoprenis ĝin krom 24 brigadanoj el Harta pli ol 350 gejunuloj el 9 europaj landoj. Unusola ĉefino, Máša V a ĉ u r o v á instruis Esperanton al progresantaj hungaroj. Oni lernis laŭ la libro "Esperanto dum 30 tagoj" kaj "Baza turisma konversacio por hungaroj". József Horváth kaj Péter A. Rados brile prezentis prelegojn pri la historio kaj literaturo. Ĉio estis bona nur la vetero ne permesis al ni naĝi en la lago...do ni ekskursis kaj povis naĝi en termala akvo lige kun la vizito de urbo Keszthely.


V. D.

El la vivo de nia junularo

En la ĵus pasinta lernjaro 1980/81 funkciis en Bohemio kaj Moravio entute 19 Esperanto-rondetoj, en kiuj lernis la Internacian lingvon preskaŭ 300 geknaboj. Temas pri kluboj de internacia amikeco en Brno, Františkovy Lázně, Frýdek-Místek, Hořice, Cheb, Karlovy Vary /2 rondoj/, Lovosice, Lysice, Netolice, Nové Hradky, Opava, Příbor, Rouchovany, Šumperk, Teplice v Č., Vřecov, Znojmo kaj Zlín. Multaj infanoj ricevis diplometojn. Ankaŭ dum la tri etapoj de SET Lančov lernis Esperanton ĉirkaŭ 300 infanoj kaj gejunuloj, inter ili ankaŭ el Bulgario, GDR, Hungario kaj Jugoslavio. La unua etapo estis rezervita por infan-rondoj kaj la tria etapo estis gvidata de juna estraro.

Ni jam skribis pri la printempa junulara seminario en Valtice kaj pri la partopreno de junularo en la Pacmarŝo en Jablonec, sed necesas menciigi ankoraŭ du junularajn aranĝojn: la aprilan renkontiĝon de junularo en Vyškov, kiun organizis la junulara komisiono, kaj la junian renkontiĝon de junularo en Plzen, kies organizo estas merito de la lokaj junaj aktivuloj.

Fine ni volas gratuli al la gejunuloj, kiuj sukcese submetiĝis al la asocia ekzameno pri Esperanto. Jen iliaj nomoj: Marie Jančíková, Zdena kaj František Tichý kaj Jan Smejkal. Ĉiuj kvar ĉi-jare instruis en SET Lančov.



internacia panoramo

U.E.A. nun havas membrojn /asociajn kaj individuajn/ en 100 landoj.

69-a Universala kongreso de Esperanto okazos inter la 21-a kaj 28-a de julio en V a n c o u v e r /Brita Kolumbio/, Kanado.

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA decidis okazigi la kongreson en Iisalmi, Finnlando.

FRANÇOIS MITTERAND. Antaŭ la elektado, nova prezidento de Francujo, F. Mitterand, skribis al SAT-Amikaro la jenon: "Se la francoj elektos min, mi petos la registaron submeti la por-Esperantan leĝproponon al la Parlamento".

ESPERANTO-SEMAJNFINO en Belgio. Temo: "Instruado - Edukado" 30-an de okt.-1-an de nov.1981 en Lichtaart organizis Flandra Esp. Junulara Asocio, Arsenaalstraat 5, B-2000 Antwerpen, Belgio.

BELGIO. Prof. G. Boulanger kaj G. Pirlot partoprenis debatprelegon pri "Esperanto kaj lingva komunikado" kun kelkdeko da studentoj, el kiuj pluraj el la Tria Mondo, en la Instituto pri Altstudoj Ekonomiaj kaj Sociaj en Bruselo.

GERMANIO /FRG/. En Ruhr-Universitato en Bochum fondiĝis Universitata Esperanto-Grupo, kies prezidanto fariĝis Norbert Blundau. En kelkaj aliaj germanaj universitatoj jam ekzistas aktivaj studentaj Esp.-grupoj.

ROMANIO. Esperanto estas instruata dum tri jaroj /du horojn semajne/ en tuta aro da filologiaj fakultatoj. Aperis libroj rilate la Internacian Lingvon i.a. "Ĝenerala kaj kompara lingvistiko" /A.Vraciu/, praktikaj tekstoj kaj gramatiko de I.F. Bociort kaj vortaroj, ĉe la universitato de Bucuresti kaj Cluj-Napoca. Kreiĝis Esperanto-sekcio en Societo de Filologiaj Sciencoj kaj en la tuta lando agadas jam pli ol 2300 movadanoj, ĉefe junaj.

SOVETUNIO. En Krasnodar Esperanto estas akceptita kiel oficiala studobjekto ĉe la ŝtata universitato, fakultato pri sociaj profesioj. Adreso: Esperanto, p.k.18, SU - 350000 Krasnodar. - En

Vilnius L. Straznickas prezentis universitatan diploman laboron pri pronomoj en lingvoj litova, franca kaj Esperanto.

SVEDLANDO. Ĉe la universitato de Lund Hans Henriksson pretigis doktorigan disertacion pri Zamenhof. Sen personregistro ĝi estas preskaŭ 260-paĝa manuskripto.

USONO. Kun permeso de oficialaj instancoj, J.F. Conroy gvidas ĉiutagan E-lecionon por 20 gejunuloj de la altlernejo A. Lincoln en Philadelphia.

BRITLANDO. En Londono la Esp. Parlamenta Grupo konsistas nun el 126 membroj. - En unu jaro H. Brown, komisiita de Londona Esperanto-Klubo aranĝis entute 12 paroladojn pri la Internacia Lingvo. - En la universitato de Manchester en oktobro 1981 okazis por la oka sinsekva fojo Esp.lekcioj. Prelegis D-rino Marjorie Boulton kaj s-ro A.W. Rowe.

ĈINIO. En la lando funkcias en 40 urboj E-kursoj kun pli ol dek mil /10 000/ lernantoj. Starigis E-studrondoj en 15 altlernejoj kaj 20 000 personoj lernas la I.L. per korespondaj lecionoj. - Komence de marto la Daye-a Nefera Kompanio de la urbo Huangshi, Hubei-provinco, aranĝis E-kurson kun 230 gejunuloj. - Fondigis Huangshi-a Esperanto-Asocio en majo '81. Huangshi estas la dua granda urbo de Hubei-provinco. - Ekde junio '81 dujara E-kurso en la revuo "Scienca kaj teknika ĝermo". - En Changshu-gubernio la poŝtoficejo reklamas siajn servojn ankaŭ en Esperanto.

HUNGARIO. De 1981 la ŝtata biblioteko "Gorkij" en Budapeŝto fariĝis scienca instituto kaj riĉa fonto de informado pri monda literaturo kaj ankaŭ pri la Internacia Lingvo. En siaj gravaj kolektoj ĝi posedas ne nur Esperanto-librojn el Hungario kaj el multaj landoj, sed ankaŭ revuojn, diskojn, bendojn, kasedojn ktp. Estonte aperos detala bibliografio pri la ampleksiga Esp.-sekcio, kiu utilas al altlernejanoj, pedagogoj kaj ĵurnalistoj. La biblioteko celas reguli liveradon de la plej aktualaj esploroj pri interlingvistiko kaj Esperanto.

KENJO. El tiu lando venas lastatempe sufiĉe multaj informpetoj pri E. Ili estas rezulto de anonckampanjo en kelkaj kenjaj gazetoj. La kampanjon organizis Hans Bakker, UEA-komisiito pri regiona agado kaj Ian Tarrant, antaŭa volontulo ĉe UEA, nun jam de du jaroj laboranta kiel instruisto en Kenjo.

KUBO. Kvankam oficiale fondita nur antaŭ du jaroj, Kuba Esperanto - Asocio jam nombras ĉ. 1400 membrojn. Tra la lando daŭre okazas amasaj E-kursoj, kiujn partoprenas multaj centoj da homoj. Tio estas la nuna taktiko de la Asocio: unue amase diskonigi la lingvon pere de la kursoj kaj poste fondi lokajn klubojn.

SRILANKO. Srilanka Societo por Protektado de Rajtoj de la Infano /185 Baseline Road, Colombo-9, Srilanko/ eldonis broŝureton en la Internacia Lingvo.

E - A R A N Ĝ O J

De 11. - 18.11.1981 la urbo PADERBORN, F.R.G. estis centro de vigla E-vivo. La kultura kaj distra programo antaŭvidas i.a. diskutojn pri lingva kibernetiko kaj interlingvistiko, infanfeston,

kantvesperon kun eksterlandaj gastoj, kunvenon de la Eŭropa Klubo kaj Zamenhof-feston. Inf.: Europa Klubo, Kleinenberger Weg 16 B, D - 4790 P a d e r b o r n .

2-a renkontiĝo de ESPERANTO - T E A T R O J, organizota de Kroatia Esperanto-Ligo /Amruŝeva 5/I, YU-41000 Z a g r e b/ de 27. - 30. 11. 1981 en Pula. Limdato: 30. 10. 1981.

I-a Internacia Esperantista Ekonomikista Simpozio de 27. 12. 1981 - 2. 1. 1982 en Budapeŝto. Aliĝilojn bv.peti de la Scienca kaj Faka Komisiono de HEA, Budapest, Pf.193, H - 1368.

47-a Kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio de 6. - 10. 1. 1982 en Christchurch.

Internacia Foira E-ista Renkontiĝo "IFER '82", 12. - 14. 3. 1982 en L e i p z i g GDR. Ĝenerala temo "Goethe - Faust - Leipzig". Aliĝo ĉe Kulturbund der DDR, Organiza komitato de IFER, DDR - 7010 L e i p z i g, Käthe Kollwitz-Strasse 115.

RONDETA VIVO

PLZEN - La 27-an kaj la 28-an de junio 1981 okazis en la vico jam la 4-a renkontiĝo de esperantista junularo. La renkontiĝo celis transdoni spertojn el la ĝisnuna agado kaj pritrakti planon de la agado por '82. Oni ankaŭ vizitis la ekspozicion de fame konata pentristo Winter-Neprakta. Vespere la junularo ĉe la bivak-fajro gaje amuziĝis. Venontjara renkontiĝo okazos en sama tempo. M.Tá

STRÍBRO-fondita nova E.R. ĉe la urba Kulturcentro. Inicianto kaj unua prezidanto: Anna Kumžíková, Kostelní 133, 341 01 Stríbro. Dum la fonda kunveno partoprenis reprezentantoj de esp.kultura vivo-aktorino Eva Seemannová kaj la poeto Jiří Karen kun la edzino. Gratulu al la nova grupo. M.Tá

SUMPÉK-ĉi jare la membraro de ER ĉe Kulturdomo de KP Pramet unufoje partoprenis la 1-aman solenaĵon kiel memstara grupo. Ĉeestis ĉirkaŭ 30 personoj kun transparento "Esperantský kroužek". Vidu la foton.



ZNOJMO

Al letervespero aranĝita en septembro venis 41 leteroj el 12 landoj; la 10.9. estis komencita Esperanto kurso en agrokultura mezlernejo kaj en Kulturdomo. Partoprenis 29 personoj.


VELKÉ LOSINY-tradicia E-renkonto ĉe E-arbo en la baneja parko okazis la 24-an de majo.

FRÝDEK - MÍSTEK

Ekspozicio de Esperanta literaturo estis aranĝita ekde la 14.9 ĝis 20.9.1981. Estis eksponitaj ĉ. 400 libroj, nome infan-literaturo, faka, beletra, originala kaj tradikita. Eksponita estis ankaŭ la libro pri Hiroŝimo. Ankaŭ estis projekciitaj mallongaj filmoj en Esperanto kaj oni povis aŭdi el diskoj E-kantojn. La 20.9.1981 en kafejo Esperanto prelego de s-ino A. Milatová pri Pitoreska Istrio.

Krucenigmo

Horizontale: A. Inteligenta; vitra vaz/o/; bagateligita interjekcio; romie 45; en maniero de sovaga porko; farig/i/. - B. La unua parto de eldiro de Lev Nikolajevič Tolstoj. - C. Ununur/a/; kuracista specialist/o/; verda lok/o/ en dezerto; specialmaniere prepari mangaĵon antaŭ ol kuiri ĝin; kapvesto. - D. El speciala fero farita; soveta rivero enfluenta en la Blanka Maron; korinklino; azia ŝtato; nordeŭropanoj. - E. Impeta elspir/o/ de aero tra nazo kaj buŝo /kun artikolo/; svelaĵet/o/ sur hauto; tre fleksiĝem/a/; substantiva sufikso de futura pasiva participo; moralaj. - F. Centono de la skandinavia krono; prepozicio; bustuko; pagordon/o/; ŝakfiguro. - G. Adverbo signifanta "en alta grado"; stranga kutim/o/; rilatantaj reproduktistojn; ŝakluda mov/o/ per reĝo kaj turo samtempe; maloftag/a/. - H. Nedifina pronomo; la dua parto de la eldiro; prefikso pri parenceco. - I. Grasa likvaĵo; patro de patro; rilatantaj lokojn; nomo de para numeralo; mallongigitaj nomoj de zoologiaj gardenoj.



Vertikale: 1. Faraĉ/i/; hazardmaniere elekti helpe de pluraj objektoj. - 2. Hav/i/ konscion; gaso ĉirkaŭanta la terglobo. - 3. Ne tiu kartoemblemo. - 4. Pronomo; muzika signo ĉe komenco de la notliniaro; rabobest/o/. - 5. Malbona; sufikso pri kolekto de samspecaj objektoj; senliveco. - 6. Likvaĵo sekreciata de la hepato; neniu objekto. - 7. Bestreĝa; abundega. - 8. Hav/i/ ian formon; sid/i/ sur ovoj. - 9. Ne progres/i/; senlima periodo. - 10. Forta frapo; elirig/i/. - 11. Roma bronza monero; duobla arbovic/o/; estaĵo de idnaska sekso. - 12. Arbeid/o/ kun rozkoloraj floroj. - 13. Stamp/o/ en pasporto; malmola korp parto/o/; refleksiĝa adjektivo. - 14. Vive brili; senmankaj. - 15. Artikulo kaŭzanta akarozon; trinkaĵo. - 16. Mara rabisto; la supera vestpart/o/. - 17. Disfalaĵo; altmontara parhufulo. - 18. Sicilia vulkano; ruga ĝardenarba frukt/o/. - 19. Kovri per maldika tavolo de multekosta metalo; prepozicio

uzata ĉe kvanto; korp parto moviganta la kapon. - 20. Nomo de la 15a E-a litero; hereda klas/o/ da homoj en Hindio; demanda pronomo pri objekto. - 21. Neordinaraj travivaĵoj. - 22. Vesta rapidfermilo; nordafrika/o/. - 23. Densa bruna aroma likvaĵ/o/; abrupta flankensoviĝo de auto.

Helpo: C. Onego. - E. Oero. - 4. Mel/o/. - 9. Eono. - 12. Tamarisko. - 23. Joro.

Adolf Staŭra

Sendu al nia redakcio la ĝustan tekston de la eldiro plej malfrue 14 tagojn post ricevo de tiu ĉi n-ro de Starto. Kvar lotitaj solvintoj ricevos libropremiojn.

Ĉar malfruiĝis Starto 4/81 ni publikos solvintojn de estinta krucenigmo en n-ro 6/81.



Per ĉiuj 25 vortoj vi pagas 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonante el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

str. Sienkiewicza 11/1 37700 PO-HMYSL, Pollando deziras korespondi.

Du junuloj /19 kaj 25j./ korespondos kun ĉeĥoslov. knabinoj pri ĉiuj temoj. Adreso: Vochin Marian, Ĉasuta postala 3093 714 00 BUCURESTI 30 Rumanio.

19-jara ĉeĥa junulino /muziko, bildkarto, pentrado/volonte korespondos kun eksterlandaj geamikoj: Jana Šimková, Sládkova 503, CS-394 64 P o ĉ á t k y, Ĉeĥoslov.

31-jara fervojisto korespondos tutmonde pri sporto, muziko, turismo. Interŝanĝos BK, diapozitivojn. Antonín Dvořák, Wolkerova 41, CS-783 35 Horka n/Mor.

Maria Vasileva, str. Georgi Pakli-vanov 12, ŜUMEN kaj Kasimira Koeva, str. Petro Parĉevič 29 ŜUMEN, Bulgario - 17jaraj knabinoj deziras korespondi.

23-jara polo Johano Marzyjanek,

"NEOGLIFOJN" de Sommer-Batěk serĉas kaj pri fotocela pruntedono de n-roj 1, 19 ĝis 22, 26, 34, 56 de "La PACDEFENDANTO" petas Jaroslav Mařík, Štěpánská 9, CS-120 00 Praha 2.

INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

Jak jame již sdělili v minulém čísle STARTO připravuje náš svaz svůj 4. sjezd v březnu /19.-21./ 1982 v Pardubicích. Půjde bezesporu o důležitý mezník ve vývoji naší organizace, protože dojde kromě voleb nových svazových orgánů i k projednávání změn ve stanovách svazu.

Změny mají prohloubit především organizační strukturu svazu, demokratický centralismus a vymezit či upřesnit práva a povinnosti členů svazu. Je ve vašem zájmu, abyste se s návrhem stanov detailně seznámili. Budou k dispozici ve všech našich místních skupinách koncem tohoto roku. Zájemci, kteří se chtějí zúčastnit svazu jako diváci a dozvědět se mnoho zajímavého, shlédnout připravované výstavy o činnosti svazu za uplynulé období, se musí co nejdříve přihlásit na adresu svazu.

Sociologický průzkum byl dokončen mezi členy i nečleny našeho svazu. Dotazníky obdrželo více než 2.200 osob. Jaké jsou výsledky tohoto dosud nejširšího průzkumu v dějinách esperantského hnutí se dozvíte buďto z českého textu, který byl zaslán všem místním skupinám, anebo z esperantského překladu, který si můžete objednat na adrese svazu a zaslat ho, třebaš jako dárek vánocům, vašim zahraničním přátelům. Napište si o něj rovněž na adresu svazu. Cílem průzkumu bylo zjistit post. je lidí k esperantu.

Další vhodné dárky pro vaše zahraniční přátele můžete obdržet v sekretariátu svazu. Jsou jimi zejména knihy v esperantu:

1. Karel Čapek - Povídky z jedné a druhé kapsy 27,- Kčs
2. kolektiv - Uprostřed Evropy 15,- Kčs
3. J. Fučík - Reportáž psaná na oprátce 25,- Kčs
4. J. Nešvadba - Ztracená tvář/povídky/ 15,- Kčs
5. kolektiv - Slovenská antologie 34,- Kčs
6. P. Bezruč - Slezské písně 11,- Kčs
7. různí - kulturní almanachy PANORAMO/3 díly/pol6,- Kčs
8. Marček S. - anekdoty, křížovky 14,- Kčs
9. kolektiv - Jihočeské hrady a zámky 8,50 "
10. kolektiv - Soubor přednášek z ekolog. semináře . 39,- Kčs

Nezapomente, že vhodnou propagací jsou vkusné nákupní tašky s několika barevným a perantským symbolem. Bude se jistě líbit i vašim přátelům. Cena je dostupná / Kčs 2,50/. Stejně tak jsou ještě skladem pohlednice z ČSSR a Lančova, barevné a esperantským textem za Kčs 1,60. Používejte je, abychom mohli brzy vydat nové.

Máte rádi anekdoty? Kdo by neměl! Nezapomente si tedy objednat roztomilou brožurku: ANEKDOTOJ PRI GABROVANOJ, kterou máme skladem za Kčs 5,50.

Zájemci o esperantologii, historii esperanta a esperantské hnutí upozorňujeme, že máme rovněž skladem tyto knihy:

- | | |
|------------------------------------|-----------|
| Historio de Esperanto / PLR/ | 24,-- Kčs |
| La Tuta Esperanto / MLR/ | 16,-- Kčs |
| Metodika demendaro / MLR/ | 6,-- Kčs |

doktoro de la Ĉeĥoslovaka Antologio" /Budapest, 1935/.

La literatura agado de Kamaryt, honora membro de UEA, estis tre ampleksa. Li pruvis ankaŭ talenta tradukanto. Restas preskaŭ nekonata, ke li tradukis la "Majon" de Mácha kaj la dromon de V. Nezval "Ankoraŭ hodiaŭ subigas la suno super Atlantujo". /La manuskriptoj bedaŭrinde kuŝas ie ĉe nekonataj homoj/. El instruaj verkoj ni posedas ankaŭ lian "Mezinárodní jazyk" /Internacia Lingvo/, "Filozofian vortaron" kaj slovakon "Esperanto-ŝlosilon". Same aŭtoro de la ĉeflingvaj "Pri duspeca vero" kaj "Pri la unusignifeco de etika juĝo" estas li.

En la manuskriptoj tamen konserviĝis - kvankam kun la manko de sep numeritaj paĝoj - lia historio de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado. Li ekverkis ĝin laŭ sugesto de Somera Esperanto-Tendaro en Žimrovice /precipe de la studento Novobilský/ kaj finis ĝin en 1955. En la posta jaro li mortis, en Havlíčkův Brod. La unua parto prezentas lian rememoran priskribon de la movado, la dua laŭfakan temaron. Post kelkajaro eĉ nervostreĉa laboro de la redakta kolektivo /Echtner, Werner, Hršel, Mařík, helpitaj de Cířchová-Hrdličková kaj Patera J./.. La verko jam estas preta kaj eldonota en 1982. Ĝi enhavas kun la indeksoj persona kaj bibliografio, 271 paĝojn da tajpita teksto. Ĝi estas kompletigita per tre multaj novaj faktoj kaj per ĝisdatigo konciza al 1969, kiujn elserĉis kaj liveris J. Mařík.

La Historio de Kamaryt viciĝos inter unikajojn de la historia Esperanta literaturo kaj restos daŭra monumento al la esperantisto Kamaryt.

Kiu konis doktoron Stanislav Kamaryt - skribis siatempe lia intima kunlaboranto Otto Ginz - neniam forgesos tiun ĉi homon plenan de saĝo, homon de nobla karaktero kaj de plej bona koro.

Kaj estu aldonite: la grandan pioniron!
/La cindro de S.K. kuŝas en la tombejo en Praha-Holešovice, apud la Fučík - parko/.

Jaroslav Mařík

REMEMORE PRI D-RO TOMÁŠ P U M P R

La 2-an de oktobro 1981 ni rememoras neĝisvivan 75an naskiĝtagon de d-ro Tomáš Pumpr. Li forlasis nin tro frue estinte elĉerpita korpe kaj anime pro la tro ampleksaj taskoj, kiujn li mem starigis antaŭ si kaj pro la sorto-batoj, ker kiuj la vivo tiel malavare superŝutis lian vivvojon. En la personeco de d-ro T. Pumpr foriris el la enlanda kaj tutmonda Esperanto-movadoj respektata lingvisto, elstara tradukanto, kapabla organiza laboranto kaj antaŭ ĉio homo, kies personaj ecoj estis ekzemplodona.

La ampleksa verko, kiun li postlasis al ni, apartenos daŭre al la trezoro de la E-kulturo. Ni citu almenaŭ liajn majstrajn tradukojn de "Bukedo el la naciaj mitoj" /K.J. Erben/, "La baptado de caro Vladimír" /K.H. Borovský/, "Majo" /K.H. Mácha/ kaj "Sileziaj kantoj" /P. Bezruč, tradukitaj kune kun J. Kořínek kaj R. Hromada/. Liaj opertradukoj de "Vendita fianĉino" /B. Smetana/, "Najado" /A. Dvořák/ kaj "En la puto" /V. Blodek/ ebligis



Septembre vizitis nian Asocion k-do Klement Tholet, es-
tinta membro de Centra komitato de Belga komunista partio kaj
nuna sekretario de MEM-sekcio en Belgujo.

En la interparolo pri laboro, sociala stato kaj la vivnivelo
de laboristoj ni audis la informojn, kiujn ni ĉiutage povas le-
gi.

K-do Tholet transdonis al nia asocio donace Lernolibron por
pioniroj, surbaze de la ĈE-metodo.

La fotografaĵo montras geedzojn Klement kaj Monika Tholet dum
la vizito de la Kastelo en nia ĉefurbo.

Radiomatoroj, kiuj interesigas pri kontaktoj en
Esperanto skribu al s-ano František Haszprunár, Střelnická 1971,
182 00 Praha.

Znovu upozornujeme vŝechny členy, že od roku 1982 nebudeme za-
jišťovat a distribuovat některé časopisy. Jsou jimi: Juna Amiko,
Bulgaro Esperantisto, Pola Esperantisto, der Esperantist a PACO
/bulharské vydání/. Vše lze objednat v PNS, dovoz tisku.

Nadále budeme dovážet a distribuovat časopisy:

Heroldo de Esperanto, Homo kaj Kosmo, národní čísla PACO, Budapeš-
ta Informilo a Dia Regno. Bližiší informace vám sdělí sekretariát.

STARTO - neprevídělný věstník Českého esperantského svazu,
Jilská 10, CS 110 00 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů
svazu. Vychází 6x ročně. Za obsah tohoto čísla odpovídá
PhDr. Jeromír Jermář a Zdenko Křimský. Grafická úprava Milan
Labašta, kresby Pavel Rak. Foto na titulní straně M. Labašta,
uvnitř časopisu D. Kočvara, Křimský a archiv. Tiskne Technic-
ké střední knihoven Praha. Předáno do tisku dne 1.10.1981. Do-
hledací pošta Praha 07, snížený poplatek za poštovné povolen
ředitelstvím pošt Praha pod č.jed. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

STARTO - presorgano de ĈEA, Jilská 10, CS 11000 Praha 1, ape-
ras sesfoje jare.

Ĉefa Esperanto Asocio

ofertas pere de turista oficejo REKREA al eksterlandaj geespe-
rantistoj jenajn arangojn:

1. Jablonec aprilo 1982 - 6 tagoj
Kilometroj de amikeco - 23.4. - 28.4.1982
turista arango /marsadoj en diversaj disciplinoj/. Trari-
gardo de apuda urbo Liberec kaj 2 taga vizito de Praha.
Loĝado en hoteloj.
Orienta prezo kun manĝaĵo kaj en landaj vojaĝkostoj
aŭ Kčs 1.974.-
U\$ 187.-
2. Třebíč - Lančov Somera Esperanto Tendaro
- 3 kursoj po 14 tagoj - 4 horoj instruoj de
- 4 foje tage manĝaĵo Esperanto
- 3 ekskursoj - bano en lago, sporto
- karnevalo - medicinista servo
Termoj: 04.07. - 18.07.1982 prezo Kčs 1.595.-
18.07. - 31.07.1982 aŭ U\$ 177.-
01.08. - 14.08.1982
3. Písek - Ekskursoj en la historio
9 tagoj/8 noktoj - majo-junio
La arango celas montri aleksterlandanoj belegajn angulojn
de tiu regiono /naturon, burgojn, kastelojn, arton, arkitek-
turon ktp./ Partoprenantoj loĝos konstante en unu hotelo kaj
pere de buso ekskursos ĉiutage en alian direkton. Ili vidos
akzemple kastelojn kaj lokojn Orlík, Zvíkov, Hluboká, Tábor,
Husinec, Vodňany.
prezo Kčs 3.108.-
aŭ U\$ 291.-
4. Pardubice - 4-a Kongreso de ĈEA - 19. - 23.3.1982
Krome de partopreno de tiu ĉi interesa arango, kie ekster-
landanoj pli intime konatiĝos kun la Esperanto movado ili
vizitos kaj trarigardos dum 2 tagoj Praha. Loĝado en hoteloj.
prezo Kčs 1.799.-
aŭ U\$ 151.-

Vian aliĝon vi povas sendi rekte al nia asocio aŭ
al REKREA. Estas ebla por grupoj aldoni kroman programon.
Dum ĉiuj arangoj servos ĉiĉeronoj kiuj parolas Esperanton.

Internacia deklam-konkurso en Hungario

Kadre de la Monato de Paco kaj Amikeco dum la 29-30-aj de majo en 1982, inter diversaj programoj okazos internacia deklamkonkurso, far de la Packomisiono de HEA, Departementa Komitato de Hungara Esperanto Asocio je Csongrád kaj loka Esperanto Grupo de Szentes /eldiru: Sentes/. Postulatas poemoj kaj tradukoj nur el la verkoj de Kolomano Kalocsay. Fontmaterialo troviĝas en la ĵus hungareldonita libro: "Tutmonda Sonoro". Sinanonci oni povas en tri kategorioj, infana-, junula-, kaj plenaĝa kun du libere elektitaj poemoj, unu nepre pri pactemo. Inter la du tagaj programoj okazos urbovizito, kulturprogramo, koncerto, internacia deklamkonkurso, solena pacdemonstracio kaj ceteraj. Por la aliĝa registro oni tuj anoncu, sed nepre ĝis la monatmezo aprilo en 1982. Detalojn petu kaj adresu al: "IFJUSÁGI HÁZ IGÁZGATÓ", Esperanto Pacdemonstracio H- 6600 SZENTES Hungario

POBYTY v MLR

Nabízíme vám účast na esperantských akcích v Maďarsku prostřednictvím DCK REKREA. Vaše objednávky nám zašlete co nejdříve. Ceny jsou uváděny bez dopravy.

datum	název akce	cena cca v Kčs
19.-23. marto	Internacia Festivalo de Esperanto Teatroj /IFET/	1.600 - 1.700
6. -11. aprilo	Junulara Esperanto Renkonto /JER/	cca 800
4.- 10. julio	20-a Jubilea Somera Esperanto Universitato /SEU/	1.500
julio	15-a Pionira Internacia Tendaro /PIT/ /infanoj 10-13 jar./	1.850
19.-28. julio	15-a Internacia Renkonto Naturamika /IREN/	1.150 - 1.800
1.- 13. aŭgusto	Somera Esperanto-Lernejo en Eger /SELE/	1.800
dec.28 - jan.2.	12-a Vintra Esperantista Ferio /VEF/	1.650

KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbotavolo - duparta pordego - deklina tegmento - sen planko - facila montado aŭ sur submuro aŭ sur ebena tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Larĝo 3030 mm alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malonga tempo 1-2 semajnoj liveras

PRAHA (kooperativo)

INKLEMO

Skribajn mendojn sendu al la adreso de komerca fako: INKLEMO PRAHA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA 9, Spojovací 11, aŭtelefonu al n-ro 83 09 49. Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporton ni povas certigi. Remizojn ni liveras nur al privatuloj.



HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon — kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas: la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ
— oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro —

KARLOVY VARY - FRANTIŠKOVY LÁZNĚ - MARIÁNSKÉ
LÁZNĚ - JÁCHYMOV - TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY - JANSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ - JESENÍK
LUHAČOVICE - TEPLICE NAD BEČVOU

BALNEA *

Reprezentanto de ĉeĥoslovakaj banlokoj kaj kurac-fontoj,
PAŘÍŽSKÁ TRĚDA 11, 110 01 PRAHA 1, ĈEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215